

Vojon ekiru

LA MOND-KARAVANO

(originale verkita)

1. Vo - jon ek - i - ru al
Re - vas mil - mi - loj sur -
land' sa - tu - ri - ta de be - no.
vo - je pri fes - ta al - ve - no.
Se pe - zas man', hel - pos vin sam - i - de - an':
Ku - nas ja kor' kaj kom - pre - no.

2. Urĝas tra montoj, en valoj, kuraĝo kaj rido.
Lingvo komuna vin ligas, fratec', forta fido.
En ĉies man' / glaso plenplena kaj pan':
Vi nur disdonu, homido.
3. Ĉerpu esperon el spert' kaj inspiraj rakontoj.
Vin bonvenigas hejmlando; jam freŝas la fontoj.
Do man' en man' / marŝu la mond-karavan':
Ravos vin verd', horizontoj.
4. Dion kun homoj en paca pilgrimo adoru.
Ankaŭ dum ploras l' animo, kantante Lin gloru.
Sub Lia man' / mildas eĉ morto, malsan':
Venu, ho Regno, aŭroru.

VOJON EKIRU • LA MOND-KARAVANO • M (Lobe den Herren = Praxis pietatis): 17a jc., religie: Stralsund 1665, Halle 1741 • GL 258, nGL 392 • EG 316, 317 • KG 524 • RG 242 • EM 82 • LH 60 • E (originale verkita): Jacques Tuinder 2000-11-05

Pri ĉi kanto, proponita de Jacques Tuinder por ADORU, atentigis Siegfried Krüger 2013-07-25.

La subtitolon *La Mond-karavano* aldonis Albrecht Kronenberger 2013-07-31 pretigante tiun ĉi kantfolion por la 63a KELI-Kongreso en Svitavy, Ĉeĥio (3a ĝis 10a de aŭgusto 2013).